La Oftecoj de la Esperantaj Korelativoj

David G. Simpson, Ph.D.
Laurel, Maryland, Usono
Septembro 2007

Resumo. La ofteca distribuo de la 45 korelativa vortoj en Esperanto estas studata, uzante la tekstojn el Esperantaj libroj havebla ĉe la Interreto.

I. Enkonduko.

Esperanto havas 45 korelativajn vortojn, kiujn oni povas krei laŭ regula kaj logika sistemo (Tabelo 1). Tamen, ne ĉiom da la korelativoj okazas kun egala ofteco. En ĉi tiu studo, mi analizas 69 Esperantaj tekstoj havebla ĉe la Interreto por trovi kiuj korelativoj okazas plej ofte, kaj kiuj okazas plej malofte.

II. Diskuto kaj Konkludoj.

Por efektivigi la studon, mi uzis la retpaĝon `http://bertilow.com/tekstaro` por la analizo de Esperantaj tekstoj. Mi kolektis statistikon de 69 tekstoj, ampleksante 4,675,412 vortojn. La studo inkludas ĉiujn formojn de la korelativoj; ekzemple, la statistiko por la vorto *kiu* inkludas la formojn *kiuj*, *kiun*, kaj *kiujn*.

La distribuo de la 45 korelativoj estas montrata en Tabelo 1 kaj Figuro 1.

La studo trovas ke la plej ofta korelativa vorto en Esperanto estas *kiu*, kiu konstituas 17.7% da la okazoj de korelativoj.

Oni trovas ke la plej malofta korelativo estas *ĉial*. Efektive, la vorto *ĉial* okazas preskaŭ neniam: ĝi aperas nur unufoje el ĉiom da la tekstoj, en listo da korelativoj en la *Ekzercaro* de L.L. Zamenhof.

Prefiksoj. Oni povas uzi la datenon por trovi la oftecon de la korelativaj prefiksoj. La studo trovas ke la plej ofta korelativa prefikso estas *ki-*; la plej malofta estas *neni-*. La distribuo de oftecoj aperas en Tabelo 2 kaj Figuro 2.

Sufiksoj. Simile, la dateno trovas ke la plej ofta korelativa sufikso estas *-u*; la plej malofta estas *-es*. La distribuo de oftecoj aperas en Tabelo 3 kaj Figuro 3.

	ki-	**ti-**	**i-**	**neni-**	**ĉi-**
-o	kio (4.65%)	tio (9.41%)	io (1.51%)	nenio (1.17%)	ĉio (2.13%)
-u	kiu (17.72%)	tiu (11.36%)	iu (1.98%)	neniu (1.56%)	ĉiu (6.64%)
-a	kia (1.08%)	tia (2.38%)	ia (0.82%)	nenia (0.32%)	ĉia (0.26%)
-e	kie (1.97%)	tie (3.45%)	ie (0.18%)	nenie (0.06%)	ĉie (0.21%)
-el	kiel (8.54%)	tiel (4.13%)	iel (0.21%)	neniel (0.22%)	ĉiel (0.03%)
-al	kial (1.13%)	tial (1.13%)	ial (0.06%)	nenial (0.002%)	ĉial (0.0004%)
-am	kiam (5.42%)	tiam (2.34%)	iam (0.68%)	neniam (1.19%)	ĉiam (1.59%)
-om	kiom (0.53%)	tiom (0.74%)	iom (1.82%)	neniom (0.05%)	ĉiom (0.003%)
-es	kies (0.89%)	ties (0.35%)	ies (0.04%)	nenies (0.01%)	ĉies (0.03%)

Tabelo 1. La oftecoj de korelativaj vortoj en Esperanto.

ki-	41.95%
ti-	35.29%
i-	7.30%
neni-	4.57%
ĉi-	10.89%

Tabelo 2. La oftecoj de la korelativaj prefiksoj.

-o	18.86%
-u	39.26%
-a	4.87%
-e	5.87%
-el	13.13%
-al	2.33%
-am	11.21%
-om	3.15%
-es	1.33%

Tabelo 3. La oftecoj de la korelativaj sufiksoj.



Figuro 1. La oftecoj de korelativaj vortoj en Esperanto.



Figuro 2. La oftecoj de la korelativaj prefiksoj.



Figuro 3. La oftecoj de la korelativaj sufiksoj.